Esperanto

# INTER NI

## Gazeto por universalaj paco kaj frateco

laŭ la Interna Ideo de Esperanto kaj la Homaranismo

Volumo 5 Numero 2 (28) 1931

**Redakcio:** Theodor Wilhelm Teich, Wilhelm-Straterstr. 43 Gladbach-Rheydt, Germanl. (Poŝtĉekkonto: Essen 32073)

**Centra sidejo:** Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas'Road, Finsbury Park, London N 4, Anglujo.

**Koresponda sekretario:** F. Curto Basté, Oliva 28 (Sagrera), Barcelona, Hispanujo.

**La Jarabono** (kun aŭ sen membreco) estas libervola; minimume ni petas sendi laŭeble: germ. rm. 2.— (aŭ angl. ŝil. 2/- aŭ sv. fk. 2.50 aŭ egalvaloron). Abonjaro havas ses numerojn.

2

## El la enhavo

**La vojo al paco** — N. Soederblom

**La granda ĝojo** — E. F. G. Klimaschewski

**Perforto aŭ ne** — J. N.

**Per iliaj fruktoj**

**La plej decida (diskuttemo)**

**Malbono kaj liberiĝo** — H. W.

**El la Evangelio laŭ Johano**

**Dietaj reguloj** — Max Heindel

# Nia Laboro.

Ni ĉiuj sentas, ke feliĉeco inter la homoj povos veni nur per tio, ke trans ĉiuj baroj ili estas interligataj en sincera amikeco. Tio estas la celo ankaŭ de la Interna Ideo de Esperanto kaj de la Homaranismo. La unua volas interkomprenigi la popolojn sur neŭtrala fundamento de komuna lingvo apud la propra; kaj la dua alvokas la anojn de la diversaj mondkonceptoj, klasoj, nacioj ktp., ke ili interrilatu sur la bazo de ĝenerale homa, etika regulo. Tiu regulo estas, ke ĉiu traktu la alian, kiel li mem deziras esti traktata; kaj ĝi sendube signifas, ke oni laŭforte agu kiel amiko kaj helpanto de sia proksimulo, kie ajn tiu la helpon bezonas kaj petas. Ni scias, ke tio estas ankaŭ laŭ volo de la Kristo.

La Internianoj sentas la taskon, varbi, ke tiu spirito de universalaj, sinoferaj servemo kaj bonvolo ekregu en ĉiuj aferoj de nia mondo. Tiu komuna tasko nin igas kunlaboradi, kaj ĝi estu la gvidilo por nia tuta sintenado en asociaj kaj gazetoj aferoj. Por ĝia ĉiam pli bona plenumo ni volas prepari niajn kapablecojn kaj nian tutan intelektan, sentan kaj fizikan vivon.

**Ĉiujn ni invitas, partopreni nian agadon,** por ke baldaŭ la homaro vivu en kompletaj libereco, fratamo kaj harmonio.

---

# Ĉiunumere ni denove demandas:

**Kiujn progresojn kaj spertojn vi akiris en la laboro por nia celo?**
**Kiujn problemojn vi renkontis dum laboro kaj studado?**
**Kiajn solvojn vi trovis je la problemoj, kiujn ni disponis por diskutado? (Vidu paĝon 21!)**

---

Manuskriptojn, anoncetojn ktp., **por la gazeto** oni bonvole ĉiam **sendu rekte al la redakcio** (T. W. Teich) en Rheydt.

---

Pri aferoj de **membreco** kaj **reprezentado** de nia ligo oni turnu sin al nia **Koresponda Sekretario** (F. C. Basté, Barcelona). Li ankaŭ sendos informojn pri nia ligo al adresoj de eksteraj interesuloj kaj daŭrigas korespondadon kun ĉiuj, kiuj por tiu donas seriozan bazon.

# INTER NI

Gazeto por universalaj paco kaj frateco

laŭ la Interna Ideo de Esperanto kaj la Homaranismo

Volumo 5 Numero 2 (28) 1931

## La vojo al paco.

De N. Soederblom.

Por sukcesigi la pacigajn penadojn, ni devas ilin fari pli realaj. Ne gravas, ĉu oni estas korektkredanta laŭ iu aŭ alia »paciga recepto«, sed estas bezono, ke oni vere ion faras por la paco.

Ĉiuj homoj bonvolaj unuiĝu kaj sendubiĝu je tio, ke por gajni pacon **ni devas bataladi kontraŭ disiĝemo, kontraŭ malamo kaj maljusteco.** La batalado devas esti direktata precipe kontraŭ tiuj malnovaj tendencoj **en ni mem;** kaj tiusence ne ekzistas alia vojo krom la mallarĝa, kiu nomiĝas turniĝo. Kiam la Dia regado venkas la nediajn fortojn en la homaj koroj, tiam povas iom efektiviĝi ankaŭ la eksteraj benoj kaj necesaj rimedoj por la tutmonda paco. (I. C. P.)

## La granda ĝojo.

De E. F. G. Klimaschewski.
(Mallongigite.)

Jam antaŭ proksimume 2000 jaroj venis en la mondon la „nova sento“, la bazo de nia „Interna Ideo“, kiel Zamenhof nomis la ĉefan aferon de la esperantistaro. Tiel venis al ni sciigo de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo (Luko 2 : 10).

Tamen — vidante ankoraŭ tiom da malfeliĉuloj — ĉu oni ne devas dubi pri la vereco de la bonega sciigo kristnaska? Ĉu ĝi restas tute certa por ni post tiom multaj malgajaj spertoj? — La kristnaska ĝojo venas el la dia mondo kaj tial daŭru senfine, sed dependas de **ni**, ĉu ni ĝin povas vere trovi, kompreni, ekkapti kaj teni.

Amo dia! — kiu vi en la kristnaska tempo pruviĝas tiom bela, multeflanka kaj varia! — kiel ni vin povas savi por la vivo ĉiutaga?

Jen kiel ni povas fariĝi ĉiamaj periloj de diaj amo kaj ĝojo: ni fidele sekvu al la stelo de la pura vero! Dio volis, ke ĉiuj homoj estu savitaj per veno al scio de la vero; kaj ke tio estas ebla, bonaŭguris tiu, kiu diris: „Vi scios la veron kaj la vero vin liberigos.“ (Joh. 8 : 32.)

Tial estas bone vivi laŭ la gravega admono (I. Petr. 1 : 22): „Ĉastiginte viajn animojn, **en la obeo al la vero,** por sincera amo al la frataro, **amu unu la alian el la koro fervore.“**

# Perforto aŭ ne.

De J. N.

Eble vi jam legis la kongresparoladojn de D-ro Zamenhof. Rememoriĝu la duan tian kongresparoladon, kiu okazis en la jaro 1906 en Ĝenevo. D-ro Zamenhof tiam pritraktis la „Internan Ideon“ de Esperanto. Ĝia esenco estas, konduki la homojn per Esperanto al frateco kaj justeco. Ne ĉefe por celoj materiaj D-ro Zamenhof kreis sian lingvon; multe pli gravaj ol ili estis al li la etikaj instigoj de la Esperanto-uzado. Tiuj lastaj estis la interna motoro en lia tuta laborado por Esperanto. Per la Interna Ideo, kunigita kun Esperanto, li volis socie reformi.

Ĉu tio estis necesa? — La respondon donu al ni D-ro Zamenhof mem. Li diris pri la tiama socia stato en sia patrujo jene: „Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo . . . tie la naturaj filoj de la sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel samaj naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento . . ., kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj sovaĝuloj.“

En tiu intergenta batalado la judoj plej multe suferis. Sur ilin amasiĝis la freneza kolerego de la batalantoj, kaj el la granda genta mizero elkreskis por la suferantoj la genio, kiu montris vojon al frateco kaj justeco. Estis lia celo, ke frateco kaj justeco anstataŭu la perforton, per kiu plimulto penas subpremi malplimulton, kaj per kiu oni volas devigi aliajn forĵeti la homan liberecon por agi laŭ volo de la altrudantoj.

Ĉu ia perforto jam atingis vere daŭran sukceson? Ni traserĉu la homaran historion — ĉiam ni trovas praviĝita la vorton de Jesuo-Kristo, kiun Li diris al sia disĉiplo Petro: „Ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos.“ (Mat. 26 : 52.) Ideo, kiu volas plibonigon de la socia stato, estas potenco tiel energihava, ke homoj fordonis por ĝi sian vivon kaj per tiu sia oferdono kreskigis la amason de la anoj. Kial tion la potenculoj ne pripensas?! Perforto ŝajne estas iu mistero diabla, kiu blindigas la homojn, — alie ne estas eble kompreni, ke ĉiam ripetiĝas la sama batalado inter bono kaj malbono.

Kiam ajn en la historio oni trovas kreskadon de nova problemo, la perfortuloj neniam kulpigis sin mem. La kaŭzojn ili serĉis ĉiam en la aliaj, kiujn ili subpremis ne demandante pri justeco kaj frateco. — Justeco kaj frateco ja ne estas taŭgaj bataliloj de perforto!

**Ni, kiel ideaj esperantistoj, tamen nur konas kiel batalilojn ĝuste tiujn fratecon kaj justecon;** ilin ni portas en nia brusto, kaj per ili ni venkas la diablan beston en nia personeco, kiu volas tenti nin al perforto, maljusteco kaj malamo. Frateco kaj justeco fariĝis partoj de nia vivo, fariĝis niaj instigiloj,

kiuj devigas nin al agado, al sindona agado, por ke la homaro elkresku el la socia mizero. Se aperas novaj sociaj problemoj, ni volas serĉi la kaŭzojn en ni mem kaj volas labori, ke tiuj kaŭzoj malaperu. Neniam ni volas uzi la rimedojn, kiujn uzas la perfortuloj. Se ni unue nin mem rigardas kaŭzantoj, ni ne plu kulpigas la aliajn. Ili fariĝas al ni homojfratoj, kiuj bezonas nian helpon, kaj tiun helpon ni volas doni frate kaj ame. Homarano.

# Per iliaj fruktoj . . .

La Londona gazeto „Daily Herald“ en artikolo „The lonely Island“ publikigis historieton, kies vereco estas garantiita. Ni elprenas la jenon:

— En la Granda Oceano, suda Pacifiko, tagveturon for de la ordinara ŝipvojo, estas la pitoreska Pitcairn- (pitkern) Insulo. Antaŭ 1790 ĝi estis neokupita, sed ĉirkaŭ tiu tempo kelkaj ribelantoj forlasis siajn ŝipojn, enloĝiĝis unue en Tahiti kaj en 1796 parte transiris al la relative ne-malproksima Pitcairn. Estis senbridaj, neinstruitaj homoj, kiuj tie kulturis la teron.

Mankoj je la bezonoj de l' vivo, sortobatoj kaj malsanoj malpliigis la nombron de la enmigrintoj, ĝis fine restis nur unu sola blankulo. Li troviĝis inter la ankoraŭ vivantaj edzinoj, kiujn la maristoj estis alkondukintaj de Tahiti, kaj inter ilia infanaro. Tiu loĝantaro grandiĝis tiel, ke post iom da tempo Pitcairn fariĝis multe tro malgranda por ili; kaj tial en 1856 la tuta kolonio devis migri al la Norfolk-insulo.

Ses jarojn antaŭ la foriro de Pitcairn, do en 1850, oni sendis al la insulo kimron, kiu unuigis en si la profesiojn de masonisto kaj de forĝisto, instruiston kaj de ambaŭ la edzinojn. Tiuj kvar personoj havis la taskon, helpi al civilizo de la tiea popoleto. Alvenante ili konstatis la enloĝantojn ordemaj homoj kaj sinceraj kristanoj, kiuj vivis en krude konstruitaj sed tamen belformaj lafŝtonaj domoj.

La kimro esprimis sian surpriziĝon, kaj oni informis lin, ke — post Dio — ĉi tio estis merito de la maljuna ribelulo, kiu tiam estis la plej aĝa enloĝanto de la insulo. Tiu-mem ne respondis je la pria demando, sed solene kondukis la kimron al sia logejo, kie li montris al li multe uzitan Biblion. Tute simple li diris: „Iutage mi sidiĝis pripensante, kiel mi povus helpi al la multaj infanoj kaj virinoj. Tiam mi rememoris ĉi tiun Biblion, kiun ni estis prenintaj de la ŝipo. Ĝia legado min pentigis kaj montris al mi, ke eĉ mi havis bonokazon. Tiel mi komencis instrui kaj helpi la aliajn“. —

*

»Per iliaj fruktoj vi konos ilin« (Mat. 7 : 16).

# La plej decida.

Respondoj pri la diskuttemo 5-a.

Demandite estis: „Ĉu la nomo de Kristo aŭ ĉu niaj agoj estas plej decida por la eterneco“ (laŭ Mateo 25 : 34—40 kaj Johano 3 : 18)? Pri tiu temo la redakcio ricevis la sekvante presitajn kvar respondojn.

**I.**

Nura (ekstera) kredo je Jesuo estas kvazaŭ semo senfrukta. Kredo sen konvenaj agoj ne estas grava. Kiel Jesuo-Kristo bele instruas en sia alegorio, Li estas kvazaŭ vinberarbo kaj ni devas esti Liaj branĉoj (Joh. ĉ. 15). El Li ni devas tiri sukojn, t. e. fortojn por nova kredo, sed ni devas ankaŭ alporti fruktojn: — agojn. Kio povas helpi, ke ni kriadas „Sinjoro ni kredas vin“, se ni ne samtempe sekvas Lin kaj Lian dian instruon? Li mem diris, ke al Li ne apartenas tiuj, kiuj vokas „Sinjoro, Sinjoro!“, sed tiuj, kiuj plenumas la dian volon.

Kristo estu en nia animo naskita, el Li ni ĉerpu fortojn por nova vivo kaj por tiaj agoj, kiaj nin pruvas Liaj disĉiploj. Tiaj agoj superos la homan leĝaron, ili sin etendos al konformeco je eternaj, Diaj leĝoj. De Li ni prenu fortojn por la plenumo de tiuj altaj ordoj, kaj tial per Lia helpo niaj agoj elradiu renovigitan naturon de filoj diaj. En nova esteco Kristo lumigas niajn agojn kiel ĉiela suno lumigas la florojn. Kristo do estas nia suno, sed se nia vivo estas en Li, ĝi ankaŭ devas elradii konvenajn florojn — fruktojn — agojn. Li tralumas nin por ke ni fariĝu novaj estaĵoj, por ke ni estu »vivaj branĉoj«, kiuj ĉerpas sukojn el Li (el la granda »vinberarbo«), kaj kiuj tial donas fruktojn. Tiel ni povas alporti agojn laŭ eternaj diaj leĝoj — agojn laŭ Diamo kaj laŭ homamo.

La Logoso-Kristo en ni donas al ni eternan vivon, ĉar kiu havas la »Filon«, tiu havas la vivon, kaj kiu ne fidas Lin ankaŭ ne trovos eterne neinterrompitan konsciecon. Kiu fidas, t. e. kiu kredas kaj vivas per Li, tiu ne estas juĝota, tiu per Li ankaŭ ricevas eternan (konscie neinterrompitan) vivon = »senmortecon«. **Ambaŭ do estas decidaj:** kaj la Kristo, kaj la agoj kiuj elfluas el krist-ana vivo kaj estas el Li ĉerpitaj. B.

**II.**

Plej decida por la eterneco estas **la nomo de Kristo:**

Ĉar (unue) laŭ Johano 3 : 18 fido al la nomo decidas, ke ni „ne estas juĝataj“, sed estas savataj el infero kaj trovas envenon en la ĉielon;

Ĉar (due) nia fido al la nomo de Kristo decidas niajn agojn mem — kion ajn ili prias;

Kaj ĉar (trie) alia parto de Johano 3 : 18 estas la vorto: „Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj“ (Agoj apostolaj 4:12). M.

### III.

Mi kredas:

— ke ne la agoj estas precipa kriterio, sed ke la **pensoj**, la sintenado je la proksimulo decidas;

— ke aliflanke ne la kredo en la nomo de Kristo, sed la **vojo** de Kristo estas necesa por ĉiu homo. Tiu vojo estas: »doni sin mem sur la altaro de la homaro« — aŭ: »la mistika morto«. K.

### IV.

Permesu, ke mi citu la Biblian vorton (Galatoj 6 : 8): „Kiu semas por sia karno, el la karno rikoltos putradon; sed kiu semas por la spirito, el la Spirito tiu rikoltos eternan vivon“.

Kutime ni »semas por la karno«, t. e. ni agas por surteraj interesoj, ĝuoj, honoroj kaj bezonoj, kaj dum tio ni fidas je niaj fizikaj aŭ intelektaj fortoj. Ĉiutage ni spertas kaj vidas tian agadon laŭ la karno, kaj ni ankaŭ scias, ke jam ĉi tie sur nia tero ĝi kaŭzas malharmoniojn internajn kaj eksterajn. La postmorta vivo estas daŭrigo kaj rikolto de la antaŭmortaj agoj, vortoj, sentoj kaj pensoj; tial estas evidente, ke (laŭ Mat. 25 : 41—46) niaj nunaj porkarnaj agoj kaŭzas malharmoniojn ankaŭ en la regiono, kie ni troviĝas post nia adiaŭo de la pli kaj malpli dense fizika.

Aliflanke la supre menciita vorto (Galatoj 6 : 8) kaj same Mat. 2 : 34—40 diras al ni, ke niaj »semoj por la Spirito« kaŭzas benojn. Se mi iun petas „agi en mia nomo“, tio signifas, ke li faru la koncernatan aferon tute tiel, kiel mi mem ĝin estus faranta. Laŭ Joh. 3 : 18 ni samsence sintenu „en la nomo de Kristo“ t. e. ni tute vivu tiel, kiel niaokaze Jesuo-Kristo estus farinta aŭ faranta. Pri Li ni scias, ke Li ĉiam »semis sur la spirito«, ke Lia tuta vivo estis servado kaj sinofera helpado; kaj tial ni komprenas, ke niaj veraj nuntempa kaj postmorta feliĉecoj dependas de tio, ĉu ni imitadas Lin (aliesprimite: ĉu ni ĉiam agas „en Lia nomo“).

Ni ĉiuj emas agi pli laŭ la vojo de l' karno ol laŭ la vojo de l' spirito (= de l' Kristo), ĉar ofte ŝajnas al ni, kvazaŭ la vojo de l' spirito kaŭzus perdojn. Pri tio jam meditas Asaf en la 73-a Psalmo. La vojo de l' karno permesas al ni, uzi perforton, **trompadon kaj** ĉiun ajn alian rimedon, kiu devigas aliajn agi laŭ niaj egoistaj sentoj (deziroj); la vojo de l' spirito instruiĝas en vortoj kiaj Luko 6 : 27—38, tiu spirita vojo estas sinofera, elama helpado al aliaj. Ne estas mirige, ke unua-vide la vojo de l' karno multe pli allogas nin ol la vojo de l' spirito, kaj tial ni bezonas f i d o n. En Mat. 6 : 31 ĝis 33 kaj en Luko 12 : 29—31 Kristo rekomendas al ni, serĉi la regnon de Dio kaj Lian justecon, kaj Li asertas, ke se tutkore ni faros tion, ĉiuj niaj surteraj bezonoj estos prizorgataj de la ĉiela patro. Ni do bezonas la fidon, ke finfine la spirita vojo nepre enhavas la plej altan valoron, kaj ke, se en la ĉiutaga vivo ni tutkore sekvos al ĝi, ĉio necesa estos nia. Per tia fido ni gajnos forton, kuraĝon kaj volon tutplenajn por agi laŭ la spirito; kaj tiujn agojn sekvos benoj kaj nunaj kaj postmortaj.

La temataj bibliaj vortoj (Mateo 25 : 34—40 kaj Johano 3 : 18) do tute ne kontraŭparolas reciproke, sed **ili esprimas samajn pensojn en diversaj fazoj.**

Spirita homo estas komparebla kun planto: — la agoj estas kvazaŭ la substancoj, per kies esencoj la frukto (= la animo) estas konstruata, — kaj la fido estas la foliaro, kiu akceptas la radiojn de la suno kaj kiu tiel e b l i g a s la konstruadon. Fido kaj agoj tiel laboras kune por la sama frukto.

# Malbono kaj liberiĝo.

El »**Problemoj religiaj**« de H. W., esperantigita de St. B.

Bono estas ago krea de Dio. Ankaŭ malbono estas krea ago, sed de liberaj kaj penskapablaj estaĵoj, kiuj sian liberan volon, tiun krean potencon, uzis en mala direkto kaj metis sian volon super la volon dian. Tiel stariĝis la malbono en la mondo. Ĝi do ne estas dua dio eterna, sed dependa produktaĵo de pensantaj (kaj tial kreantaj) estaĵoj. Se malbono estus eterna kiel bono ĝi ankaŭ estus dia.

Homo estas kreanto, ĉar je bildo de Dio li estas kreata. Li devus krei laŭ ekzemplo de Dio, laŭ Lia volo, krei bonon, esti helpanto de Dio en la granda kreadplano. Tamen ankoraŭ la homo kreas malbonon kaj taksas ĝin super bono. Tio estas morala falo, malsuprenpuŝiĝo de kreaj, intelektulaj spiritoj el la ĉielo de bono al abismo de infero. Do ne Kreinto-Dio faris originale la malbonon, sed kreaj estaĵoj, kiuj sian krean potencon estis ricevintaj donace. Ĉeesto de malbono en ni tial montras ne malperfektecon de Dio, sed baziĝas sur krea memvolo malbone uzita kaj kondukita kontraŭ la Dian volon.

Inter la spiritoj la anĝeloj estas pli altaj ol ni; sed estis spiritoj iame anĝelaj, kiuj surtere prakaŭzis la malbonon (kiu do estas tre forta). Religio devas malkaŝi respondecon je la morala falo inter la homoj. Sed malgraŭ ĉio: la malbono ne estas eterna.

Antaŭ la civiliza epoko, kiam la intelekto ankoraŭ ne estis evoluinta, estis neeble konscii kaj tute priskribi la problemojn, per kies solvo la homaro povas liberiĝi de sia mortiga malmoraleco. Nun vekiĝis konscio de krea potenco, per kiu homo povas re-alkondukiĝi al la unua stato de moralpureco.

Konscian senmortecon la Kreinta Dio ne donis senpage; ĝin ricevas nur tiuj, kiuj e k k o n a s l a v e r o n. Vero kaj konscia senmorteco devas esti akirataj de pensantaj kreitaj estaĵoj per potenco kaj krea memregado de siaj intelektoj. La kreitaj estaĵoj devas kaj povas sole per malkovro de Vero perfektigi sian kreitecon; kaj nur per tia elmontro de la interne kaŝita Logos-o, ili povas akiri konscian senmortecon. Tiu fakto montras plej altan saĝecon, plej

altan bonecon de ilia Kreinto.

Al evoluado de la Logos-o en la homo servas kaj kondukas memkrea plenumo de la moralaj leĝoj, kaj la celo de tiu memkrea plenumado estas renaskiĝo spirita de la homo. Tiu celeco de morala sintenado do havas perspektivon de senmortigo de intelektaj estaĵoj.

# El la „Evangelio laŭ Johano“.

La Evangelio laŭ Johano estas ofte diferencigata de klarigantoj je la Evangelio laŭ la aliaj tri apostoloj, ĉar laŭvide la aliaj skribintoj pli simple »raportas« ol Johano, dum Johano estas dirata »priskribi kaj pentri laŭ la instigoj de amanta koro«. Kompreneble la prudento povas montri ĉion e k s t e r e pli korekte ol la sento; sed la lastaj kaj plej profundaj radikoj de afero ofte revelaciiĝas nur tiam, kiam amo kaj racio kunlaboras. Tiel ankaŭ Johano, la »disĉiplo de la amo« volas konduki nin precipe al la s p i r i t a j kaj plej i n t e r n a j bazoj de kristanismo.

„En la komenco estis la Vorto . . .“ — majeste ekkantas la apostolo sian verkon per skizo pri la ekestiĝo de ĉio ekzistanta. Sciencistoj asertas, ke la kosmo naskiĝis per moviĝo aŭ svingado de la elektrona prasubstanco antaŭe trankvila. Vorto estas svingado, oscilado, kaj tiel la evangelisto jam antaŭ 1900 jaroj diris la samon, kion nuntempe ankaŭ asertas la ordinara scienco. Tamen estas diferenco: la sciencistoj opinias, ke la eksvingado okazis en s e n v i v a substanco, kaj tial ili povas tute klarigi nek la kaŭzojn de la plej unua eksvingiĝo, nek la kaŭzojn de la unua apero de vivo; — aliflanke la apostolo Johano diras ĉi tie, ke la »prasubstanco« estis la dia universala spirito, kiu la movon kaj la vivon havis en si mem kaj tial ilin povis elmontri.

Se ni rigardas monton de diversaj flankoj, ĉiuj flankoj eble prezentas specialajn »aspektojn« de la altaĵo, kiu tamen estas unu kaj nedividita. Ankaŭ ĉiu magnetsageto montras al ni, ke afero sendivida povas aperi en diversaj »polusoj«. Tiel same Johano provas klarigi la »Vorton« (= la movon) kiel »aspekto« de la Dia aŭ kiel unu »poluso« ĝia (verso 1). Tiu kvazaŭ negativa poluso ekrevelaciiĝis per la diversaj formoj (v. 3). La alia, pozitiva poluso de la dia fariĝis la interna lumo aŭ vivo de la formoj (v. 4); sed ju pli densaj la formoj kristaliĝis, des pli malfacile fariĝis por la vivo (lumo), labori per ili. Tamen jubile sonas „la mallumo ĝin ne venkis“ (v. 5): — kiam la danĝero estis plej granda, tiam „de Dio estis sendita viro . . . por atesti pri la lumo“ (vj. 6—8), kaj tiu viro parolis pri „la vera lumo, kiu lumas al ĉiu homo venanta en la mondon“ (v. 9).

Oni povas diri, ke la celo ankaŭ de la tuta Johana Evangelio estas esprimita per tiuj vortoj pri la atestanto, kaj tiel estas kompreneble, ke tre grandan spacon de la skribo prenas la predikoj de

ĝia centrulo — Kristo — pri si mem (kiu Li estas, kiel Li rilatas je la Patro, kaj kion Li signifas por la homoj). La tiurilataj paroladoj trovas sian resumon en la konata vorto (14 : 6): „MI estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la patro krom per MI“. Tri klarigsistemoj estu pri tio esence konigataj. (Daŭrigota.)

# Biblio-studado 15. III.—31. V. 1931.

**Marto.**

| | |
|---|---|
| 15-an | Joh. 1 : 1—5 |
| 16-an | „ „ : 6—13 |
| 17-an | „ „ : 14—18 |
| 18-an | „ „ : 19—28 |
| 19-an | „ „ : 29—34 |
| 20-an | „ „ : 35—39 |
| 21-an | „ „ : 40—51 |
| 22-an | „ 2 : 1—12 |
| 23-an | „ „ : 13—17 |
| 24-an | „ „ : 18—22 |
| 25-an | „ „ : 23—25 |
| 26-an | „ 3 : 1—10 |
| 27-an | „ „ : 11—15 |
| 28-an | „ „ : 16—21 |
| 29-an | „ „ : 22—30 |
| 30-an | „ „ : 31—36 |
| 31-an | „ 4 : 1—14 |

**Aprilo.**

| | |
|---|---|
| 1-an | Joh. 4 : 14—26 |
| 2-an | „ „ : 27—38 |
| 3-an | „ „ : 39—45 |
| 4-an | „ „ : 46—54 |
| 5-an | „ 5 : 1—9a |
| 6-an | „ „ : 9b—16 |
| 7-an | „ „ : 17—29 |
| 8-an | „ „ : 30—36 |
| 9-an | „ „ : 37—47 |
| 10-an | „ 6 : 1—15 |
| 11-an | „ „ : 16—21 |
| 12-an | „ „ : 22—27 |
| 13-an | „ „ : 28—35 |
| 14-an | „ „ : 36—40 |
| 15-an | „ „ : 41—51 |
| 16-an | „ „ : 52—59 |
| 17-an | „ „ : 60—66 |
| 18-an | „ „ : 66—71 |
| 19-an | „ 7 : 1—9 |
| 20-an | „ „ : 10—13 |
| 21-an | „ „ : 14—20 |
| 22-an | „ „ : 21—24 |
| 23-an | „ „ : 25—31 |
| 24-an | „ „ : 32—36 |
| 25-an | „ „ : 37—44 |
| 26-an | „ „ : 45—53 |
| 27-an | „ 8 : 1—11 |
| 28-an | „ „ : 12—20 |
| 29-an | „ „ : 21—24 |
| 30-an | „ „ : 25—30 |

**Majo.**

| | |
|---|---|
| 1-an | Joh. 8 : 31—37 |
| 2-an | „ „ : 38—42 |
| 3a-n | „ „ : 43—47 |
| 4-an | „ „ : 48—59 |
| 5-an | „ 9 : 1—12 |
| 6-an | „ „ : 13—25 |
| 7-an | „ „ : 26—33 |
| 8-an | „ „ : 34—41 |
| 9-an | „ 10 : 1—10 |
| 10-an | „ „ : 11—21 |
| 11-an | „ „ : 22—31 |
| 12-an | „ „ : 32—42 |
| 13-an | „ 11 : 1—10 |
| 14-an | „ „ : 11—22 |
| 15-an | „ „ : 23—38 |
| 16-an | „ „ : 39—45 |
| 17-an | „ „ : 46—52 |
| 18-an | Joh. 11 : 53—12 : 8 |
| 19-an | Joh. 12 : 9—19 |
| 20-an | „ „ : 20—33 |
| 21-an | „ „ : 34—43 |
| 22-an | „ „ : 44—50 |

| | | |
|---|---|---|
| 23-an | . . . . „ **13** : 1—11 | |
| 24-an | . . . . „ „ : 12—20 | |
| 25-an | . . . . „ „ : 21—35 | |
| 26-an | . . . **Joh. 13** : 36—**14** : 6 | |
| 27-an | . . . . **Joh. 14** : 7—15 | |
| 28-an | . . . . „ „ : 16—24 | |
| 29-an | . . . . „ „ : 25—31 | |
| 30-an | . . . . „ **15** : 1—12 | |
| 31-an | . . . . „ „ : 13—17 | |

**Malnova Testamento.**

**Marto** (15—31-aj): **Genezo** [= I. Moseo] ĉapitroj 1—17.

**Aprilo** (1—30-aj): **Genezo** ĉj. 18—47.

**Majo** (1—3-aj): **Genezo** ĉj. 48—50;
„ (4—31-aj): **Eliro** [= II. Moseo] ĉj. 1—28.

**Vi estas la salo de la tero; sed se la salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? ĝi jam taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de homoj.**

**Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj por ke ili vidu viajn bonajn farojn kaj gloru vian patron, kiu estas en la ĉielo.** (Mat. 5 : 13—16.)

1. Prenu mian vivon, Di',
Mi dediĉas ĝin al vi;
Ĉiu tago kaj moment'
Vin laŭdadu sen silent'.

2. Ĉiu mia korpa mov'
Estu nur sub via pov';
Man', piedo, sen rezerv'
Agu nur por via serv'.

3. Celu mi per ĉiu kant'
Glori sole vin, Reĝant';
Ĉiu vorto kaj parol'
Estu nur laŭ via vol'.

4. Monon ne konservu mi —
Ĉiun spezon prenu vi;
Prenu pensojn de l' anim'
Ĉiun povon de esprim'.

5. Prenu mian volon, ĝi
Apartenu nur al vi;
Mia koro estu don'
Por la via reĝa tron'.

6. Prenu min, ĉar mi, Sinjor',
Vin amegas kun ador';
Nun kaj ĉiam vivu mi
Ĉie, ĉiel, nur por vi.

(El: Butler, Himnaro Esperanta.)

Se iu celas nur al propra bonfarto kaj ne al tio ke li estu bona kaj helpu al aliaj, liaj paroloj pri homeco estas kvazaŭ grakado de korniko. W. Heydorn.

Por helpi al aliaj necesas sinteni superpersone, t. e. neinfluate de persona opinio, antaŭjuĝo aŭ malamikeco.

Farmer.

# Dietaj reguloj (1—2).

De Max Heindel.

1. Viandaj manĝaĵoj detruas sanon kaj vivon.

Ĉiuj viandaj manĝaĵoj, ankaŭ birdaĵo, fiŝoj kaj viandaj buljono kaj graso, estu forigataj el la dieto. Kial? Ĉar besta viando ne estas vera nutraĵo; ĉar la homo ne estas laŭnatura viandbezonulo; ĉar viandmanĝado mallongigas la daŭron de l' vivo; ĉar multaj malsanoj kaŭziĝas per viandmanĝado; kaj ĉar viandmanĝado akcelas la kutimojn uzi alkoholaĵojn, tabakon kaj drogojn.

2. Viando estas malpuraĵo.

Manĝaĵo el besta viando ne estas vera nutraĵo, ĝi estas malkonsekrigita, duavica produktaĵo. La besto prenis cerealojn kaj aliajn vegetarajn nutraĵojn, sed iliajn nutrantajn kaj vivhelpantajn energiojn ĝi uzis multrilate por sia propra bono, kaj la homo erare supozas, ke la nun putranta korpo estas nutraĵo. Nur malgranda parto de la nutraj substancoj estas konstruita en la bestan histaron, kiun la homo nomas »viando«, kaj tiu parto estas fakte tiom malkonsiderinda, ke eĉ la plej bona viando enhavas ne pli ol 20 ĝis 30 procentojn da nutraĵa valoro, nome albumenon kaj grason. La necesaj mineralaj saloj kaj la gravegaj vitaminoj estas tute perditaj, kaj la restintaj 70 ĝis 80 procentoj estas »akvo«. Tiu akvo estas malpurigita per urin-acido kaj aliaj venenaj defalaĵoj de la besta korpo, kiuj estis survoje al la eligaj organoj, kiam la morto finigis la proceson;

— kaj por tia akvo la nescianta homo pagas tiel altajn preżojn per mono, vivo kaj sano!

(Daŭrigota.)

## RAPORTOJ

# Inter vi kaj mi.

De L. Jenkins.

**Februaro** 1931.

De post la reorganizo de la Interniaro mi ricevis multajn leterojn; la plejmulto montris varman aprobon kaj kelkaj esprimis bedaŭron pro la ŝanĝoj, sed estis aliaj kiuj tute malpravis pri la nuna pozicio, pro tio mi deziras rememorigi ĉiujn ke la celo de la „Interniaro“ estas (1), diskonigi la instruojn de Jesuo Kristo per la disdonado de la Sanktaj Skriboj, (2) la kunigo de tiuj kiuj **estimas** kaj **kredas** je la instruoj de Jesuo per la formigo de internacia kristana frataro kaj la eventuala fondigo de komunuma kristana kolonio.

La celo estas sufiĉe etendebla por permesi la eniron de ĉiuj kiuj sincere simpatias kun la instruoj de Jesuo, kvankam oni eble ne apartenas al iu ajn eklezio, aŭ ne povas akcepti entute la dogmojn

ĝenerale subtenatajn de la eklezianoj.

La fundamenta bazo de la Interniaro estas **Kristo** kiel elmontrita en la Evangelioj, kaj nia **kredo** estas ke la sola rimedo por la savado de l' homaro estas **per la praktika aplikado de la instruoj de Jesuo.**

La demando „ĉu oni akceptas la vortojn de la Biblio laŭlitere de la komenco ĝis la fino" ne estas farita, ni volonte lasas tiajn diskutkaŭzajn doktrinojn al la persona decido de la anoj mem. La punkto pri kiu ni plejmulte interesas, estas la neceso de la enloĝado de la Krista Spirito en la homa koro (tio estas alivorte: „ĉu Dio [Amo] regas la ĉiutagan vivon") Estas nia deziro purigi nian asocion de tiuj, kiuj kontraŭas al Kristo, sed ni tute ne intencas forpeli tiujn, kiuj honeste serĉas la veron kaj penadas servi Dion laŭ la lumo donita.

Mi tutkore bonvenigas la du novajn grupojn fonditajn dum Januaro.

1. Fayoum, Egiptujo, (pro la penado de S-ro Tadros Migalli, St. Bahr Anz, Ginenet, el Hosary, Fayoum, Egiptujo).
2. Södertälje, Svedujo, (pro la penado de S-ro Henning Larsson, Skogsidyllen, Södertälje, Svedujo).

La anoj de ĉi tiuj grupoj deziras korespondadon, sendu salutkartojn.

Al tiuj kiuj sendis abonojn por la gazeto, subtenon por nia laborado, aŭ donacojn kaj leterojn responde al mia alvoko pri la »kristana kolonio« ni tutkore dankas. Tiujn kiuj ne jam sendis, ni ree invitas subteni.

Se la Dio permesos, mi intencas viziti la Krakovan Kongreson, pro tio mi ŝatus ricevi fruan sciigon de tiuj, kiuj povos helpi nin pri la aranĝoj por fakka kunveno de la „Interniaro". Se vi mem ne povas ĉeesti, mi petegas, ke vi sendu subtenon por ke nia asocio estu bone reprezentata.

Kun frata amo al vi ĉiuj,

Livingstone Jenkins.

---

Unu el la du infanoj de s-ro José Garcia Ferreira Múrias (nia reprezentanto por Portugalujo) reiris al la supera hejmlando. Samon ni devas sciigi pri nia amiko, s-ro L. Denton, de Londono. Ni kondolencas.

Pro la adiaŭo de s-ro Denton, la Nord-Londona „Inter-Ni"-grupo bezonis novan prezidanton. Elektita estas s-ro Tempest Hope Ridpeth, 34 Ecclesbourne Gardens, Palmers Green, London N. 13, Anglujo.

S-ro F. Curto Basté, Oliva 28 (Sagrera), Barcelona, Hispanujo, sciigas, ke li deziras speciale interrilatigi la esperantistajn biblilegantojn. Li petas konsilojn de interesuloj.

La redakcio ricevis peton, ke ĝi „daŭrigu presadon de komencitaj kaj ne finitaj »Dek Motivoj«". La koncernata artikolo estas ĝisfine presita jam en la unua numero de 1929.

Demandite estis krome pri la signifo de la vorto „kopii" laŭ pola lingvo. La kvinlingva eldono de la Zamenhofa Fundamento indikas „kopjować" (pĝ. 132).

**„Kiel kredo pri ĉiupova amanta Dio estas harmoniigebla kun la teruraj okazaĵoj sur la tero?“**, pri tiu temo ni diskutu venonta-numere (1931 : 3). La duevenonta numero (1931 : 4) enhavu pensojn de niaj legantoj pri la demando: **„Kion kaj kiel utilas preĝado?“** Ni tre dankas al la geamikoj, kiuj ĉinumere kunlaboris, kaj ni esperas, ke ankaŭ estonte multaj partoprenos la diskutojn.

## SENKOSTAJ ANONCETOJ DE NIAJ ABONANTOJ.

(Niaj membroj abonantaj rajtas senkostan anonceton ideinterŝanĝan, membroj subtenantaj [t. e. kiuj pagas almenaŭ 6.— ĝis 10.— RM pojare] rajtas du tiajn anoncetojn. Anoncetoj de pli ol 15 tekstvortoj estas senpagaj nur, se la respektiva kotizo estas pagita por pluaj jaroj.)

Oni klopodu havigi por ni korespondantojn inter ĉiulandaj skoltoj, oni provu instigi skoltojn studi Esperanton kaj skribi al ni aŭ eĉ viziti la internacian tendaron.

La skolta laboro estas vicigebla al la laboro de „Inter Ni“, ĉar ĝi celas (1-a) realigi pacan interkomprenon inter junularo, (2-e) helpi ĉie kaj al ĉiuj kie estas necese kaj eble, (3-e) kreskigi solidarismon sur religia, kristana fundamento, kaj (4-e) formi el junuloj sekvantojn de Kristo kun firma karaktero, ke ĉiu estu pli homa homo kaj decidkapabla en ĉiuj cirkonstancoj. Tiajn virojn bezonas la mondo. Do, ĉiuj internianoj kunhelpu, amikiĝu kun skoltoj, kaj se eble fariĝu mem gvidantoj kaj instruantoj de skoltoj, por realigi ankaŭ per Esperanto la celadon: pli bonan homaron.

Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Nagy Sándor-u. 6, Budapest V, Hungarujo.

---

Sophie Cipera, Schubertstr. 42, Linz a. D., Aŭstrio, kolektas senpagajn specimenojn de esperantistaj gazetoj el la tuta mondo. Ŝi jam havas 78 diversajn. Ĉiu donacanto rekompence ricevos manpentritan silkan legosignon.

---

S-ro P. Kazlauskas, Gražuliu km., Simno pošt., Litovujo, deziras ideinterŝanĝon kun gejunuloj de la tuta mondo. Respondo garantiata, skribu nur esperante.

---

Mi deziras korespondi kun internianoj kaj aliaj eksterlandaj samideanoj en tuta mondo. Mi estas 20-jara studento de kristanisma lernejo „Doośiśa“, kaj mi certe respondos. Tani-Motoo, Kitasono-ĉo 93, Ŝimogamo, Sakio-Ku, Kioto, Japanujo.

---

S-ro Gerrit Willem Tijman sciigas, ke li ne plu loĝas en Nederlando (Holando), kaj ke li transloĝiĝis al: Rue du Moniteur 7, Brussel, Belgujo. Tie li studas ĉe la biblilernejo de la „Mission Belge Evangelie“.

---

Ni deziras korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj, sed precipe kun Palestino kaj la Oriento. Respondu al Esperanto-grupo „Inter Ni“, s-ano Erik Grahn, Marielund, Södertälje, Svedujo.

## Teritoriaj Pagejoj.

(Aliĝoj, kotizoj ktp. povas esti sendataj por ni al niaj pagejoj kaj reprezentantoj. La ricevaĵoj ĉiuokaze kvitanciĝos de la redakcio [Rheydt] aŭ de la centra sidejo [Londono].)

Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas' Road, Finsbury Park, London N. 4, Anglujo.
Mariano K. Garcia, Bueras 367, Liniers, Buenos Aires, Argentino.
Nova Kulturo, (Atanas Nikolov), Iv. Ŝiŝman 19, Burgas, Bulgarujo.
Tomas Machala, poŝto Jablunka n. B., Przno, Ĉeĥoslovakio.
Tadros Migalli, St. Bahr Anz, Ginenet el Hosary, Fayoum, Egipto.
Charles Pauly, 5 rue de Rabelais, Vanves (Seine), Francujo.
Theod. Wilhelm Teich, Wilh.-Straterstr. 43, Gladbach - R h e y d t, Germanujo.
Poŝtĉekkonto: »Essen 320 73«.
F. Curto Basté, Oliva 28 (Sagrera) Barcelona, Hispanujo.
Paul Balkányi, Hajos utca 15. II, Budapest VI, Hungarujo.
Chin Hsii Hsin, C. of E. Mission, Wei Hai Wei, Shantung, Ĥinujo.
Andrius Borkauskas, Radviliŝkis, Ŝiauliu g-ve 80, Litovujo.
Alfred Melbye, Toftes Gt. 25-I, Oslo, Norvegujo.
Dr. F. J. Williams, Methodist Mission, Salamo via Samarai. Papua.
Stanislaw Bogdanowicz, Wisła, skr. poczt., Sląsk ciesz., Polujo.
José Garcia Ferreira Múrias, Rua Joaquim Casimiro 23, Lisboa, Portugalujo.
Julio Csapó, III. Str. Cipr. Porumbescu 18, Timişoara, Rumanujo.
Johan E. Medinius, Mosas, Svedujo.
Rev. John H. Fazel, 1122 W. 8th Street, Topeka, Kansas, Usono.

---

Senpage ricevos ĉiu, **kiu sendos la afrankon,** la jenajn libretojn:

La **Evangelio** laŭ **Marko**
La **Evangelio** laŭ **Johano**
**Biblio-partoj**
La **Kvakerismo** (mallonga raporto)
**George Fox** (bibliografio)
Specimenoj de **»INTER NI«** (Varbilo por la Interna Ideo de Esperanto kaj la Homaranismo) kaj de **»KRISTANA REVUO«.**

Mendante, bonvolu indiki vian adreson **preslitere.**

# LA „INTERNIARO“

(INTERNACIA FRATARO DE LABORANTOJ POR UNIVERSALA BONVOLO)

64 St. Thomas' Road, Finsbury Park, **London N. 4** (Anglujo).

# NE NUR ESPERANTISTAJ

ankaŭ ĉiuj aliaj temoj estas pritraktataj en la ĉiusemajna gazeto „Heroldo de Esperanto". Multaj artikoloj estas eĉ ilustritaj. Krom tio ĝi enhavas multajn aktualajn bildojn. Abonu ankaŭ vi. Kvaronjare ĝi kostas gmk. 3.—, jare gmk. 12.—! Postulu specimenan numeron ĉe la administracio

HEROLDO DE ESPERANTO, KÖLN

# Himnaro esperanta

kompilita de S-ro M. C. Butler, L. R. A. M. (212 himnoj); prezo kun afranko gmk. 1.60 kaj gmk. 2.10. Havebla ĉe Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London, W.C.1., Angl.

Se io plaĉas al vi — bonvole ĝin sciigu al aliaj.

Se io ne plaĉas al vi el ĉi tiu gazeto — bonvole ĝin sciigu al la redakcio.

Sendu al ni la adresojn de tiuj, kiujn vi opinias interesuloj je nia laboro, por ke ni donacu al ili specimenon de „Inter Ni". Bonvole skribu tiujn iliajn adresojn precize kaj legeble (preslitere).

Ekzemplerojn de Inter Ni, kiujn vi mem jam legis, bonvolu varbe doni al aliaj esperantistoj.

Resp.: Laŭleĝe T. W. Teich, Rheydt, Germ. (informenhave la verkintoj).

Presejo: Heroldo de Esperanto, Brüsseler Str. 94, Köln, Germanujo.